grupo, ni ne akceptu iajn diskriminaciojn devenantajn el moroj kaj dividecoj – neniajn kiaj laŭdas devenon, haŭtkoloron aŭ socian pozicion.

Novaj integraj procesoj, kiuj ekestis pro ŝanĝoj en la produkt-adaj rilatoj de la moderna mondo, kaj pro ŝanĝoj en progresado, kaŭzas, ke la spiritaj produktoj, kiel *Marx* kaj *Engels* indikas en "Manifesto", fariĝas ĝenerala havaĵo, kaj ke naciaj limitecoj fariĝas pli kaj pli neeblaj.

La homaro ekzistas kiel speco, ne kiel aro de individuoj kaj nacioj. Per aliro de ĉiu individuo al diversaj formoj de la kompleksaj mondaj rilatoj de la nuntempa integrita Eŭropo oni superas ĉiujn "naciajn" limitecojn kaj tiel la individuo fariĝas parto de universala kulturo.

Ĉar lingvo havas ŝlosilan rolon en naciaj kulturoj, indas liberigi ĝin de naciaj markoj kaj tiel fari ĝin bazo de universala kulturo. Kaj tio estas Esperanto, kaj tion povas fari esperantistoj, kaj speciale la anoj de Sennacieca Asocio Tutmonda.

**Adreso de la aŭtorino**
*S-ino Mira* MAKIVIĆ
*c/o University of Banja Luka*
*Bulevar vojvode Petra Bojovića 1A*
*78000 Banja Luka, Republika Srpska, BiH*
BOSNIO-HERCEGOVINO
<uni-bl@blic.net>


**Priaŭtora informo**

La aŭtorino estas juristino ĉe la Universitato de Banja Luka, Bosnio-Hercegovino. Ŝi estas firme ligita kun la urbo Banja Luka. Tie ŝi naskiĝis, tie ŝi finis la lernejan kaj universitatan edukadojn, tie ŝi loĝas, laboras kaj kreadas. Ŝi okupiĝas pri publicistiko, publikigis kelkdekojn da fakaj artikoloj en diversaj magazinoj kaj recenzas librojn el diversaj literaturaj ĝenroj, prozo kaj poezio. (Privataj retadresoj: <mira_makivic@yahoo.com>, http//:www.makivić.knjiga.rs.ba)

Redakta rimarko

*La teksto povas iom perpleksi neSAT-anojn. Kiel redaktoro de Scienca Revuo mi deziras substreki, ke ISAE volonte rilatas ankaŭ kun SAT kaj jen aŭskulti ĝian voĉon.*





# La *Varus*-batalo – decida por dumil jaroj de Europa historio

*Hans* WELLING

## Enkonduko

Tiu batalo decidis, ke la Romia Imperio ĉesigis la longjarajn klopodojn pligrandigi la imperion trans la rivero Rejno orienten. Kaj per tio ĝi plue decidis pri la lingva limo inter latinidaj kaj ĝermanaj lingvoj.

## 1. La historio

58–51 a.K. "*Bellum gallicum*" de Cezaro.

12–9 a.K. *Drusus* invadas Ĝermanion trans la rivero Rejno (*Rhein*) orienten ĝis la rivero *Elbe*.

9 a.K. Li mortas tie.

6 a.K.– 6 p.K. *Tiberius* batalas en Ĝermanio.

Kiel rezulto ĉeno da kasteloj estas konstruita, oriente de la rivero Rejno, laŭlonge de la rivero *Lippe*, kaj somera kampejo proksime de Hamburgo en la norda Ĝermanio, alia sude de Hanovro. Kun la kasteloj okcidente de Rejno estis (laŭ *Florus*) pli ol 50 kasteloj (vd. Bildon 1).

7 p.K. *Varus,* antaŭe guberniestro en Sirio, fariĝas guberniestro en Ĝermanio.

9 p.K. Batalo en "Teŭtoburga Arbaro" (lat. "*saltus teutoburgiensis*").

Tri romiaj legioj sub gvido de *Varus* (entute pli ol 10 000 legianoj) estas atakitaj de ĝermanaj triboj sub la gvido de *Arminius*. Dum tritaga batalo ili estas ĉiuj mortigitaj. La orient-rejnaj romiaj kasteloj estas poste venkitaj kaj/aŭ forlasitaj.

15 p.K. *Germanicus* faras venĝo-atakon, vizitas la lokon de la *Varus*-batalo, entombigas la trovitajn ostojn de la legianoj.

16 p.K. Batalo inter *Germanicus* kaj *Arminius*, ĉe Idistaviso (*Hameln*) sude de Hanovro. Ĝi finiĝis sendecide.

Poste la Romia Imperio ĉesigis tiun militon. La limoj de la imperio, post tiam, restis la riveroj Danubo en la sudo kaj Rejno en la okcidento de Ĝermanio. Inter tiuj ankaŭ la limeso, fortikaĵo-linio ĉirkaŭ 500 km longa, estas konstruita.

La bataloj de *Varus* / *Germanicus* / *Arminius* estis decidaj por la sekvaj jarmiloj. Per ili estis limigita la influo de la Imperio. Decidita estis ankaŭ la lingvo-limo inter latinidaj kaj ĝermanaj lingvoj.

Kiam post la 16-a jardeko kreskis la intereso pri la klasik-kultura periodo, oni pripensis, kiel la ĝermanoj venkis kontraŭ la romianoj. Pli ol cent aŭtoroj skribis kaj ili nomis pli ol cent diversajn lokojn kiel eblan lokon de la batalo, sen trovi finan solvon.

En 1997 neprofesiulo rekomencis serĉadon de la loko: estis *Tony Clunn*, oficiro ĉe la brita armeo. Surbaze de artikolo fare de la historisto *Theodor Mommsen* el 1885 li serĉadis dum sia libertempo en la regiono de *Kalkriese*, ĉ. 30 km norde de *Osnabrück* (mia hejmurbo). Li uzis elektronikan metal-serĉilon kaj havis grandan sukceson,

– ĉar li trovis centojn da moneroj. Ili ĉiuj estis stampitaj en la jaroj antaŭ (ĝis dum) la jaro 9 p.K. Kelkaj havis aldonan stampon "VAR", por *Varus* (vd. Bildon 5);

– li kaj aliuloj trovis armilojn, kaj per tio pruvis, ke ne temis nur pri restaĵoj de komerco;– ili trovis spurojn de ĝermanaj fortikaĵoj;

– ĉio ĉi konvinke pruvas, ke la batalo okazis ĉe *Kalkriese*.




**Bildo 1**: La romiaj defendolinio kaj kasteloj (◘)




Jen miaj ideoj:

Ni komparu: **Romia soldato** (vd. Bildon 2)

Li estis profesiulo. Averaĝe li servis dum 20 jaroj. Li havis la plej bonajn armilojn tiam haveblajn: kaskon, ŝildon, du lancojn (lat. *pilum*) por piki aŭ ĵeti, kaj glavon. Ĉiu armilo estis normigita, industrie produktita, de alta kvalito.


La tuta legio estis perfekte organizita kaj trejnita. Post simpla komando la kohortoj, centurioj, eĉ la legio tuj komprenis, sekvis, ekzemple svingis sin en certa direkto. Interesa estas la defendoformo nomita "testudo" (vd. Bildon 3).

Post speciala komando ĉiuj soldatoj movis siajn ŝildojn tiel, ke la tuta kohorto estis plene kovrita de la ŝildoj, ne atakebla (vd. la libron de Cezaro "*De Bello Gallico*").




**Bildo 2**: Romia legiano militekipita


La legioj marŝis en normigita, bone organizita ordo: antaŭe rajdistoj, ankaŭ flanke kun trumpetoj por doni signalojn al la kerna trupo. Tial surpriza atako ne eblis. Dumnokte la kampejo estis same normigita. Gardistoj postenis. Per tio ĉio jam dum jarcentoj la romianoj ĉie venkis.



**Bildo 3**: Romia defendoformo "TESTUDO" ŝildprotektita

Ni komparu: **Ĝermana batalanto** (vd. Bildon 4).

Li estis neprofesia militisto sed precipe farmisto, malpli bone ekipita, malpli bone trejnita. Multaj ne havis glavon, ne bone povis ĝin uzi. Ofte nur ĥaose ili batalis. Komandoj ne estis sekvataj. Do, la ĝermanoj estis klare malsuperaj.




**Bildo 4**: Ĝermano batalvestita

Kio povis helpi al la ĝermanoj kontraŭ tiuj malavantaĝoj? La historiistoj, klasikaj kaj modernaj, listigas

– la ĝermanoj konis la lokon, uzis surprizon, la romianoj estis malhelpitaj de la tre malvarma vetero kaj de la pluvo;

– la "kvanto", la nombro? Ĉu ĝi estis multe pli alta ol tiu de la romianoj? Kiom pli? Ni ne scias.

La ĝermanoj estis miksaĵo el ok diversaj triboj, unuafoje kune batalantaj. Mi tre dubas, ke tiuj punktoj sufiĉis por atingi tiun klaran venkon.

Post studado de raportoj pri Aleksandro, Cezaro, Napoleono, generalo *Rommel* el la Dua mondmilito k.a. mi pensas, ke la inteligenta uzo de specialaj ruzaĵoj ofte decidis batalojn. Ĉar s-ro *Clunn*, neprofesiulo, helpis solvi la enigmon pri la loko, mi, ankaŭ neprofesiulo, aŭdacas enmeti ideon pri la enigmo "kiel". Mian sekvan tezon vi povas preni pli aŭ malpli serioze, la juĝo restu ĉe vi.

**Unua punkto**: nur malgranda diferenco, sed eble la decida, inter romia kaj ĝermana batalantoj estis la vestaĵo:

– Romia soldato estis vestita laŭ normo: li portis jupon, mallongan. Li portis sandalojn. Liaj piedoj, liaj kruroj kaj sub la jupo ankaŭ lia postaĵo estis nudaj. Tiu vestaĵo estis bone taŭga por varmaj, sekaj landoj. Grekoj kaj romianoj ĝin uzis dum jarcentoj kaj la imperio strikte malpermesis devion de tiu normo.

– Ĝermano portis pantalonon el solida materialo, dikajn ŝtrumpojn kaj solidajn ŝuojn. Entute: vestaĵo taŭga por malvarma regiono.



**Dua punkto**: La loka "specialaĵo", la rubuso.

En mia regiono kaj en mia propra ĝardeno vigle kreskas plantoj: rubusoj. Ili havas akrajn pikilojn ĝis 10 mm longajn. Dum unu sezono rubuso kreskigas branĉojn pli ol 2 metrojn longajn. Oni povas facile planti kaj multobligi ilin. Per trancado kaj reenterigo oni povas kultivi dek plantojn el unu branĉo. En la regionaj arbaroj oni trovas ĉie ajn larĝajn arbustaĵojn de rubusoj: unu metron altaj kaj ĝis kvindek metrojn larĝaj. Ne eblas trairi ilin.

Nun imagu: La ĝermanoj dum la printempo antaŭ la batalo plantis milojn da rubusoj sur kaj flanke de la vojo, aranĝis la arbustaĵojn laŭ inteligenta plano. Ili aranĝis truojn, enfalilojn, plenajn de rubusoj. Supre en la arboj ili pendigis longajn garbojn de rubusoj, kiuj post tirado de ŝnuro subenfalis sur la legianojn.

Ĝermanaj ĉevalistoj tiris longajn arbustaĵojn trans la batalejon, per tio apartigante la romiajn kohortoj. Krom armilojn ĉiu ĝermano havis ligno-bastonojn en formo de hakilo por tiri kaj puŝi rubuso-branĉojn laŭ bezono. Dum romiaj soldatoj klopodis dishaki kaj distranĉi arbustaĵojn, la ĝermanoj pli facile transsaltis ilin, protektitaj de siaj pantalono, ŝtrumpoj kaj ŝuoj. Kompreneble la ĝermanoj ankaŭ ŝirmis la brustojn kaj krurojn de siaj ĉevaloj.

**Bildo 5** Moneroj trovitaj en *Kalkriese*




Legiano falinta estis sen ŝanco. Li devis pli batali kontraŭ la rubusoj ol kontraŭ siaj ĝermanaj malamikoj. La ĉevaloj de la romianoj, vunditaj de rubuso-pikiloj, forkuregis en paniko. Pripensu la efikon! Tuta ĥaoso!

**Kiel pruvi, ĉu vere rubusoj estis uzitaj?**

– Metalon oni povas trovi post du mil jaroj, sed plantojn ne, bedaŭrinde. Arĥeologoj serĉu! Speciale traserĉu la malmultajn trovitajn plandojn de romiaj sandaloj pri truoj pikitaj de rubusoj;

– traserĉu la trovitajn truojn kun ostoj, ĉu inter ili estas iuj, kiuj ne estas faritaj **post** la batalo por entombigi la mortintojn kiel skribis la antikvaj historiistoj, sed kiuj estis elfositaj **antaŭ** la batalo, kiel enfaliloj. Vertikala tranĉo tra truo povus doni indikojn:

– ĉu ties plej suba tavolo estas tavolo de plantoj, nome rubusoj;

– ĉu la tavolo super tiu estas tavolo de kompletaj ostaroj de legianoj, ne de kolektitaj unuopaj ostoj;

– ĉu super tiuj du tavoloj estas tavoloj de aliaj plantoj kaj polvo, kiuj tie amasiĝis dum la postaj jaroj.

Truoj elfositaj jarojn pli poste de *Germanicus* por entombigi la trovitajn ostojn de legianoj devus havi alian sinsekvon de tavoloj.

**Kvar kromrimarkoj**:

1. Romiaj soldatoj en Britio forte postulis pantalonojn kontraŭ la malvarmon, kiujn havis iliaj malamikoj. Por tio ili preskaŭ ribelis. Nur en la 60-aj jaroj p.K. la imperio fine cedis al tiu postulo. Tro malfrue!

2. La nomo "Teŭtoburga Arbaro", kiun la romiaj historiistoj indikas, estis poste forgesita. Tial oni ne konis la lokon. Post kiam la plimulto de la modernaj historiistoj decidis, ke la batalo okazis proksime de la urbo *Bielefeld* (en montaro tiam nomita *Osning*) oni renomis *Osning* Teŭtoburga arbaro. Nun ni scias, ke tio estis eraro. Oni estus fakte devinta renomi la pli nordan *Wiehengebirge*, ne la pli sudan *Osning*.

3. *Varus*. Antikvaj historiistoj forte kritikis lin kaj skribis, ke li estis aroganta, malgardema, avida je mono, kruela, tro burokrata, nesperta kiel militestro. Oni povas juĝi, ĉu tio estas politike farbita, falsita – ĉar *Varus* estis sperta kaj sukcesa en siaj antaŭaj postenoj en Afriko kaj Sirio. Lia krueleco kaj avideco je mono estis ne pli ol tiuj de *Tiberius* kaj Cezaro. La imperio kaj la imperiestro volis ŝovi la tutan kulpon al li, ne volis koncedi, ke la Imperio mem malsukcesis.

4. La "*Bellum gallicum*" daŭris ok jarojn, kaj estis sukcesa. La "*Bellum germanicum*" daŭris 30 jarojn, sen sukceso.



## 3. La fontoj

a) Antikvaj aŭtoroj

| skribita en la jaro | aŭtoro | vivis ĉ. de | ĝis | amplekso (paĝoj DINA6) |
|---|---|---|---|---|
| 12 | *MANILIUS* | | | 0,5: nur 4 linioj |
| 17 | *STRABON* | – 63 | 20 | 2,5 |
| 29 | *VELLEIUS Paterculus* | – 20 | 29 | 10 |
| 50 | *Lucius Anaeus SENECA* | – 1 | 65 | 0,5: nekohera rimarko |
| 86 | *Sextus Iul. FRONTINUS* | 40 | 103 | 2 |
| 116 | *Publius Cornel. TACITUS* | 55 | 117 | 58 |
| 120 | *C SUETONIUS Tranq.* | 75 | 140 | 2 |
| 125 | *Lucius Annaeus FLORUS* | | | 6 |
| 200 | *Cassius DIO Cocceianus* | 155 | 229 | 10 |
| 400 | *Paulus OROSIUS* | | | 1 |
| 1100 | *ZONARAS* | | | 2,5 kopio de *DIO*? |

b) Modernaj aŭtoroj

Pli ol 100 aŭtoroj okupiĝis pri la temo. Pli ol 100 diversaj lokoj de la batalo estis diskutataj.

| | | |
|---|---|---|
| 1885 | *Theodor Mommsen* | jam konkludis, ke *Kalkriese* estis la loko |
| 1985 | *Heinrich E. Weber*[1] | priskribis la rubusojn de Vestfalio kaj de la regiono *Osnabrück* |
| 1991, 1992, 1993, 1994 | *W .Schlüter* | raportoj pri la elfosadoj en *Kalkriese* |
| 1996 | *Rolf Bökemeier* | pridubas *Kalkriese* ĝis nun |
| 1999 | *Tony Clunn* | raporto pri siaj malkovroj en *Kalkriese* |

[1] *Weber H.E.: Rubi westfalici. Die Brombeeren Westfalens und des Raumes Osnabrück (Rubus L., Subgenus Rubus) (Bestimmung, Taxonomie, Nomenklatur, Ökologie, Verbreitung). Abhandlungen aus dem Westfälischen Museum für Naturkunde, Heft 3, 47. Jahrgang, Münster, 1985.*

## 4. Konkludaj demandoj

La klasikaj fontoj estas tre svagaj, kontraŭdiraj. Neniu raporto ekzistas de partopreninto. Eĉ de la antaŭaj jaroj la raportoj estas malmultaj. Komparu kun la tre detalaj raportoj, kiujn Cezaro liveris pri *Bellum gallicum* kaj *Bellum civile* enlanda. La unua mencio de *Manilius* estis skribita tri jarojn post la okazo, nur kvar liniojn longa.

La plej ampleksa raporto de *Tacitus* estis skribita pli ol 100 jarojn post la okazo. Ĉu tiu estas vere raporto? Aŭ ĉu nur fantazio? El kiu fonto li fosis? Interesas min, kiel la romianoj ĝenerale traktis raportojn. Ĉu oficialaj raportoj estis devigaj? Kie tiuj estis stokataj? Ĉu ni havas iujn? La raportoj de Cezaro, ĉu ili estis amase kopiitaj? Per kiuj metodoj? Sur kiu materialo? Frape estas, ke la (supre listigitaj) antikvaj aŭtoroj tute ne indikas siajn fontojn.

Ĉu la romianoj ne faris mapojn? Kial ne? Ankaŭ Cezaro, kiu ja estis detalema, nur per vortoj klarigas regionojn kaj vojojn. Se ĉiuj romianoj estis mortigitaj (kiel raportite) kaj *se ne estis* la origina plano de *Varus*, preni la nordan vojon – kie *Germanicus* povu trovi sen mapo la lokon de la batalo? Pri la mon-avido de *Varus*: Ĉu guberniestroj devis raporti al Romo, speciale ankaŭ pri enspezoj kaj elspezoj? Ĉu ili devis sendi monon aŭ aliajn varojn al Romo?

Fakto estas, ke tiu ĉi batal-malvenko estis decida por la fino de la longjaraj klopodoj fare de Romia Imperio pligrandigi la imperion trans la riveron Rejno orienten. **Kaj per tio, la *Varus*-batalo estis larĝaskale decida por la lingva limo inter latinidaj kaj ĝermanaj lingvoj.**


### Adreso de la aŭtoro

*Hans F. WELLING*
*Zum Ortenbrink 42*
*DE – 49205 Hasbergen* / GERMANIO

<dj4pg@t-online.de>


### Priaŭtora informo

La aŭtoro vivas proksime de *Osnabrück*, ĉirkaŭ 40 km de la loko de la batalo. Li studis elektroteĥnikon kaj informadikon ĉe la Teĥnika Universitato *Aachen* kaj laboris kiel inĝeniero en Eŭropo kaj Azio.





# La kvin Eŭropoj kaj ni

(Ĉu "Eŭropo" sufiĉas?)

*Endre DUDICH*

### Enkonduko

La titolo de jena prelego certe bezonas klarigon. Tuj je la komenco mi devas konstati kaj eldiri: *Eŭropo ne ekzistas*. Tiu eldiro ŝajnas stultaĵo, tamen ĝi estas iasence vero. Nome Eŭropo ne ekzistas kiel konkretaĵo, objektiva realaĵo, sendepende de la homa menso kaj penso, de la mondo de konceptoj kaj konvencioj. Eŭropo tamen ekzistas, kiel abstraktaĵo, koncepto, estigita per interkonsento de homoj, do konvencio. Eŭropo eĉ ne estas unu konvencio, sed (almenaŭ) kvin. Tiuj estas jenaj: *la Eŭropo de la mitologio, de la geografio, de la kulturo, de la politiko, kaj de la ekonomio.*

Kiuj estas **ni?**

Ĉiu homa individuo havas plurajn identecojn. Jen: viro (aŭ virino), junulo, ano de variaj komunumoj kaj grupoj. Ekzemple: esperantisto, instruisto. Do "ni" povas signifi ekzemple "esperantistan junularon". Ĉi tie "ni" estas konsiderata kiel *esperantistoj*. Do la interkrampan subtitolon oni devas interpreti jene: ĉu la kvinobla koncepto de Eŭropo, kaj la el tio sekvantaj rilatoj kaj situacioj, kontentigas nin kiel esperantistojn, aŭ ni celas al io pli?

## UNUA PARTO

### 1. La Eŭropo de la mitologio

En la mitologio de la helenoj (la antikvaj Grekoj) *Evropè* estis fenicia princino, filino de Agenoro, reĝo de la urboŝtato Tiro. Ŝi ekplaĉis al Zeŭso, la estro de la olimpiaj dioj. Li do surprenis la eksteraĵon de virbovo, kaj amindumis ŝin. *Evropè* sidiĝis sur lian dorson, kaj Zeŭso